

Heinrich Heine,
En dolĉega Maj’

tradukita de Friedrich Pillath

Printempe en dolĉega Maj’,
Dum la burĝonoj krevis,
El mia koro ĝerme
Amsento sin eklevis.

Printempe en dolĉega Maj’,
Dum birda kanto sonis,
De l’ kora mi sopiro
Konfeson al ŝi donis.

*Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de FRIEDRICH PILLATH (†1932-04.03).*

Arg-203-434 (2015-04-09 15:05:52)

*Tiu ĉi traduko aperis en Elektitaj Poe-
moj, Berlin: Esperanto-Verlag Friedrich El-
lersiek (2a eldono), 1920, p. 13. La ori-
gina germana-lingva versio troviĝas en
la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika
intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. Pri
F. Pillath vidu ankaŭ la vikipedian re-
tejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/
Friedrich_Pillath](http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath).*

Heinrich Heine,
En Majo

tradukita de Manfredo Ratislavo

En Majo, kiam ĉiuj
Burĝonoj malfermiĝis,
La amo kiel floro
En mia kor’ estiĝis.

En Majo, kiam ĉiuj
Birdetoj sin aŭdigis,
Al ŝi deziron mian
Sopiran mi sciigis.

*Traduko de la Germana poemo “Im
Mai” de HEINRICH HEINE (*1797-
12-13 – †1856-02-17) en Espe-
ranton de MANFREDO RATISLAVO
(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16,
D-59302 Oelde, Germanio, *1938-
11-04) en 1982-11-14.*

*MR-002-4 / Arg-203-403 (2004-04-
05 20:37:00)*

*La poemo troviĝas en la „Libro de
la kantoj“, sekcio „Lirika interme-
zo“ (1822 - 1823), n-ro I.*

Heinrich Heine,
En admirinde bela maj’

tradukita de Hans-Georg Kaiser

En admirinde bela maj’,
dum jam burĝonoj krevis,
jen ankaŭ miakore
la amo sin eklevis.

En admirinde bela maj’,
dum birdotril’ senbridis,
jen mi al ŝi sopirojn,
dezirojn, ekkonfidis.

*Traduko de la Germana poemo “Im
Mai” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 –
†1856-02-17) en Esperanton de HANS-
GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).*

Arg-203-431 (2004-03-24 07:33:04)

*La poemo troviĝas en la „Libro de la kan-
toj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 -
1823), n-ro I. La traduko estas korektita
laŭ la lasta ŝanĝo, kiun faris s-ro Hans-
Georg Kaiser en 2004-03-21.*

Heinrich Heine,
En la mirida bela Maj’

tradukita de Kálmán Kalocsay

En la mirinda bela Maj’,
dum sin burĝonoj fendis,
en mia kor’ la amon
mi disvolviĝi sentis.

En la mirinda bela Maj’,
dum birda tril’ ne ĉesis,
al ŝi sopiron mian
konfide mi konfesis.

*Traduko de la Germana poemo “Im
Mai” de HEINRICH HEINE (*1797-12-
13 – †1856-02-17) en Esperanton de
KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Ka-
loĉajo, *1911 – †1976).*

Arg-203-1082 (2010-05-26 12:08:05)